

ESPERANTO-LIMOUSIN ĜENERALA ASEMBLEO 2020

Présents : Antoine et Isabelle Brunel, Pierre Cognard, Guy Conche, Isabelle Jacob
Cendrine Jouvie, Damien Rougier Faity, Christian Lavarenne, Clair Mahé, Gilles
Tabard, Nicole Valières

Excusés : Bernard Guillien, Blandine et Carole Landais, Lucia Unia

Morala raporto (Gilles Tabard):

1. Unuflanke la situacio ŝajnas favora al Esperanto :
 - ekzistas multe da esperantaj filmoj en You-Tube kaj kelkaj havas pli ol unu miliono da vidantoj kaj tio ebligas ke la retejo de Esperanto-France estas multe pli rigardata ĉiutage,
 - I-kurso bone funkcias kun multe da lernantoj,
 - Briteliro povas esti interesa por ke Esperanto iĝu la eŭropa lingvo,
 - la kastelo Greziljono bone funkcias,
 - Ankaŭ tre gravas la operacio « *Multlingva akcelilo* » kiu estas sperto kreita de kroata metodo por montri la propedeŭtikan valoron de Esperanto en bazlernejoj por junuloj de 7-8 jaraĝaj, proponita kiel eŭropa sperto en ĉiuj landoj kun financa helpo de Eŭropa Unio per la programo Erasmus+.
2. Aliflanke la nombro de aktivuloj malkreskas, estas malpli da partoprenantoj en la diversaj esperantaj renkontoj, malpli da volontuloj. SAT, UEA havas problemojn. Estas malfacile lontempe vivigli la esperantajn klubojn. Tiujare ni ne sukcesis fari kurson en liceo d'Arsonval spite la helpon de la dokumentistino.

La sukceso de la staĝo en « Moulin de Piot » montras ke estas efike ligi esperanton kun alia temo, kiel botaniko en tiu renkonto.

Ni ankaŭ sukcesis komenci la renovigon de la retejo Eo-Limousin.

Agad-raporto 2019 de Espéranto-Limousin (I. Jacob)

- Babilkunvenoj
- Forumoj de la asocioj en Limoĝo kaj en Brivo
- Plua eldono de nia trimonata bulteno Babilemo sen limoj (I. Jacob)
- Kreado de la nova retejo fare de Carole Landais kaj Gilles Tabard. Ni nepre devas helpi ilin kun artikoloj, esperantaj novaĵoj, diversaĵoj...
- 15-a de decembro : "Sankto-Zaza" en Limoĝo kun ĉirkaŭ 20 personoj, ĉe geBrunel kaj laboro pri la retejo de Esperanto-Limousin

- En Brivo
 - Kurso en la Kultura centro : unufoje semajne ĝis junio + dufoje monate ekde septembro.
 - Brigitte kaj Julien organizis kurson dum la somero kun nova lernanto, sed poste li foriris al Tours.
 - Renkonto en liceo d'Arsonval kun lernejesto kaj dokumentistino en junio. Ili proponis ke ni prezentu esperanton al klasoj de « secondes » dum la tago de enirejo, sed sen sukceso.
 - Organizado de budoj septembre en ekologia foiro kaj forumo de asocioj. (Pluraj kontaktoj sed neniu nova lernanto).

- En Saint-Junien
 - ⑩ Lingvaj Kafejoj en Saint-Junien kun la asocio Valo kaj en St-Auvent
 - ⑩ Ekde septembro : kurso kun 5 lernantoj kaj 2 instruistoj (C. Doucelin kaj I. Jacob)

- Januaro : Turneo de Alan Neven KOVACIC, kroata esperantisto, kiu parolis pri sia lando en Brivo la 24-an de januaro kaj en Limoĝo la 25-an.
- Majo : Turneo de la familio Handzlik kiu kantis en Limoĝo la 14-an
- Junio la 15an kaj la 16an : Botanika kaj esperanta staĝo en la Muelejo de Piot (Creuse) kun Marcelo Redoulez, Gilles Tabard, Karlo Frostoj, Christian Lavarenne, Marie-Hélène Frogier kaj Isabelle Jacob

- Partopreno de kelkaj membroj :
 - Vojaĝo en landoj fare de Maria Merla, Pierre kaj Isabelle en eks-Jugoslavio kaj projekto de esperanta vojaĝo en Kroatio kaj en Bosnio-Hercegovino en junio 2021
 - Partopreno en esperantaj ĥoroj de Lucia
 - partopreno de membroj en la UEA kongreso en Lahti (Finnlando), en la brita-franca kongreso en Dovero, en la SAT-Amikara kongreso en Montlucon, en la ILEI internacia kongreso en Ĉaĉak (Serbio)

Aliaj diskutoj :

Povus esti interese krei lokajn esperantajn asociojn, en Limoĝo, Saint-Junien, Tulle... por havi surloke facilaĵojn kaj ricevi subvenciojn ?

Ni projektas repeti subvenciojn de la urbo de Limoĝo

Christian Laverenne parolas pri la libro de Hodler kiu devas aperi baldaŭe por la 100 jariĝo de lia morto libro verkita de Mireille Grosjean kaj petas ke ni aĉetu unu libron, ni konsentas se la prezo ne estos pli ol 50 €.

Ni povus kontakti la okcitanojn por kune labori.

Oni povas vidi la filmon « Angoroj » sur la retejo de UEA, diras Clair Mahé.

Jérôme Boulesteix en Saint-Léonard, okcitano kaj esperantoparolanto petas kunvenon, prelegon en la urbo por konigi la internacian lingvon.

Dankon al Carole por la laboro pri la retejo de Esperanto-Limousin. Ni devas kompleti kaj vivigi tiun retejon.

Venontaj agadojn :

- Lucia partoprenos en diversaj esperantaj ĥorusoj interalie en Interkant kiu kantos en la kastelo Gresiljono en aprilo kaj fine de junio en Parizo
- Gilles kaj sia edzino, Antoine kaj Isabelle, Pierre kaj Isabelle partoprenos en la UEA kongreso kiu okazos en Montrealo de la 1a ĝis la 9a de aŭgusto

Ni petis de Georgi Mikhalkov (Modesto), bulgara esperantisto, veni en nian regionon por paroligi esperante la diversajn komencantojn kaj li konsentis. Necesas nur organizi la aferon, ĉu en junio ?

- Esperanta staĝo en Corrèze en junio, dum la alveno de Modesto ?
- Alia esperanta-botanika staĝo kie, kiam ?
- Partopreno en la venontaj asociaj forumoj en Limoĝo kaj en Brivo
- Zamhenofa festo en decembro
- Pli da Babilkunvenoj

Venonjare en 2021 la kongreso de Esperanto-France okazos en Périgueux

Projekto de vojaĝo en landoj de eks-Jugoslavio (Kroatio kaj Bosnio-Hercegovino) en junio 2021

La universala kongreso de UEA en 2021 okazos en Belfasto

Ni voĉdonas por la morala, la agada kaj la financa raportjo unanime

Ni reelektas la trionon de la komitato eliranta : Isabelle Brunel kaj Clair Mahé kaj ni elektas novan membron : Damien Rougier Faity

Ni reelektas la samajn postenojn : Gilles Tabard kiel prezidanto, Isabelle Brunel kiel kasistino kaj Isabelle Jacob kiel sekretariino kun Lucia Unia kiel helpanta sekretariino.

